Preĝo de la kuracisto

Ho Dio de la vivo kaj Dio de la morto,
Rigardu la turmenton de mia profesi´
Kaj turnu la orelon al la humila vorto
De homo suferanta ĉe homa agoni´!

Por fronti la batalon de lumo kaj de ombro
Al ĉiaj lokoj mi iras, palaco kaj kaban´,
Sed kiel mi sukcesos, se ies tagonombro
Finiĝos pro decido de via pova man´?

Sur korpo frostiĝanta de ia paciento
De vivo kaj de morto fariĝas la batal´:
Armilon en la mano, obstinaj en silento,
Mi luktas por la vivo, vi luktas por fatal´...

El scio kaj praktiko dum jaroj akiritaj
Mi uzas kaj manovras la manon sur tranĉil´:
Mi tranĉas, mi kripligas per strekoj senhezitaj,
Se nur mi povas porti la vivon al stabil´.

Se mia mano venkas la oston de la tombo
Post harda kaj peniga batalo por la viv´,
Mi vidas retiriĝi al sia katakombo
La morton funebrigan en spita ofensiv´.

Se tamen el la korpo la tuta vivo fuĝas
Kaj lasas min klopodi sur la kadavro nur,
Sovaĝa mortigisto rimorse mi min juĝas,
Ĉar mian bisturion makulas sangospur´.

Mi petas heziteme la pagon por la servo:
La mono min turmentas, se homo mortis for;
Se ree fluis sango kaj reviviĝis nervo,
Pri mono vorto ĝenus en tia ĝoja hor´!

Dum mia tuta vivo, milfoje post recepto,
La samajn rekompencojn mi havas por la task´:
Al mia vango ĵetas la homoj sen escepto
Rideton post sukceso, insulton post fiask´...

Ho Dio de la vivo, konsentu energion
Al mano kaj al koro de ĉiu kuracist´,
Ke ĉiu kontraŭstaru la mortan asfiksion,
Eĉ se li tial perdas la lumon de ekzist´!

Ho Dio de la morto, provizu lin per forto
En la humana koro vivanta inter ĝem´,
Ke li laboru ĉiam, sentime ĉe la morto

De fremdaj, de amikoj, de filo, de si mem!